

La Eternulo estas Reĝ'

(originale verkita en Esperanto)

1. La E - ter - nu - lo es - tas Reĝ'.
2. Li re - ĝas for - te en ma - jest',
Fi - din - da es - tas Li - a leĝ',
po - ten - co es - tas Li - a vest',
la leĝ' de am' kaj par - do - nem',
for - ti - ka es - tas Li - a tron',
de li - be - rec' kaj ak - cep - tem'.
jus - te - co Li - a Di - a kron'.

3. Li mem la bono, ver' kaj bel',
en luma, nesondebla hel'.
La pensoj de la Dia kor':
sin-dono, am', kaj «esti por».

4. Li humiligis sin por ni:
Fariĝis hom' la Fil' de Di'
por nin kunesti sur la voj'
de l' kruco al eterna ĝoj'.

5. Facila estas Lia jug',
malpeza ŝarĝ' sur nia nuk'.
Kuraĝe ni transprenu ĝin
kaj portu ĝin. Li portos nin.

6. Do laŭ spirit', ne laŭ liter',
laŭ konscienco, en liber',
kun am' ni sekvu al la leĝ'
de l' Eternulo, nia Reĝ'.

LA ETERNULO ESTAS REĜ' • M (Oi kuningasten kuningas): Frans Petter Krank (1844-1910) 1889, VK 580 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2016-01-02

Por ĉi «Ambrozia strofo», angle: «Long Metre», 88.88, ekzistas multaj aliaj melodioj, ekzemple «Conditor alme siderum», ADORU 188, aŭ «Old 100th», ADORU 368.

Instigis min la unua linio de finna kanto VK 580, aŭtomate tradukita: «Ho reĝo de reĝoj».

Komparu:

- Psa 10,6 *La Eternulo estas Reĝo*
- Psa 93,1 *La Eternulo reĝas*
- Psa 93,5 *Viaj leĝoj estas tre fidindaj*
- Rom 15,7 *Tial akceptu unu la alian*
- Psa 93,1 *Li estas vestita de majesto*
- Psa 93,1 *La Eternulo estas vestita ... de potenco*
- Psa 93,2 *De antikve estas fortika Via trono*
- skolastike: *Ens, unum, bonum, verum, pulchrum convertuntur (La esto, la unu, la bono, la vero, la belo estas interŝanĝeblaj)*
- Mar 10,18 *neniu estas bona krom Unu, nome Dio*
- 1 Tim 6,16 *loĝante en lumo neatingebla*
- Psa 33,11 *La pensoj de Lia koro*
- Rom 8,31 *Se Dio estas por ni*
- Flp 2,8 *li sin humiligis*
- Flp 2,7 *fariĝante laŭ la bildo de homoj*
- Mat 11,29 *Metu sur vin mian jugon*
- Mat 11,30 *mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza*
- 2 Kor 3,6 *ne laŭ litero, sed laŭ spirito*
- Ago 24,16 *havi ĉiam konsciencan neriproĉeblan*
- Gal 5,1 *Por libereco Kristo nin liberigis*
- Aŭgusteno: *Ama, et fac quod vis (Amu, kaj faru kion vi volas)*
- 2 Reĝ 23,3 *por sekvi la Eternulon kaj observi Liajn leĝojn*

KRANK, Frans Petter (Suomujo) * 1844, pastoro, preposto, † 1910